




KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA
KAJ KULTURA REVUO

NUMERO 4 (218)
OKTOBRO-DECEMBRO 2008
VOLUMO 42

2008 4

Editeur : MCE, Grésillon, 49150 Baugé, France.
Directeur de publication : Dominik Bertrand.
Imprimeur : D. Bertrand, MCE, Grésillon, 49150 Baugé.
Dépôt légal décembre 2008. ISSN 1272-5188. 2 €.

Abonu Kulturajn Kajerojn por 2009

1^a paŝo :

Informu pri la poŝta adreso, kien ni sendu la revuon, al
Dominik Bertrand, 7, rue des Brûlis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr »

aŭ al peranto.

2^a paŝo :

Pagu 10 eŭrojn, precizigante por kiu vi pagas, al
« Maison culturelle de l'Espéranto »
dum via venonta vizito al Greziljono aŭ al peranto.

Atentu :

Komence de jaro ni ne plu sendos la revuon al tiu, kiu ne pagis
sian ĵus pasintan jaron.

Lastaj informoj pri la revuo

En 2008, pagis sian abonon nur kvindek sep homoj.

Tio apenaŭ sufiĉis por repagi la kostojn.

La oficiala eldonkvanto estis ĉirkaŭ ducent,
sed ne jam ĉiuj ekzempleroj ekvojaĝis.

La revuo alvenis al dek landoj tra la mondo.

Estis nur komenco, ĉu ne ?

Kion vi ebligas en 2009 ?

Niaj komputoroj uzadas nur liberajn kaj senpagajn programojn,
sen escepto, dank' al Linukso Ubuntu. Nia programo por enpaĝigi
estas Scribus 1.3.3 perfekte funkcia en Esperanto.

Kulturaj Kajeroj JARO 2008, NUMERO 4

HISTORIO DE LA KULTURDOMOJ

Sub la granda kverko de Greziljono p. 62
Greziljono 1978; Atentu la vipurojn!; Greziljono 1988;
Greziljono 1998; 1998, Malbonaj Memoroj.

KLERIĜADO

Arto : *La Fotelo de Zamenhof* p. 74
Verkado : *Kreado de bildrakontoj* p. 76

DISTRIĜADO

Rakonto p. 82
La Neordinara Vivo de teksisto tra la kvin kontinentoj :
Maldeca Knabo!
Bildrakonto p. 87
La Aventuroj de Steleto : Tordajfoj.
Poezio : *Hajkoj* p. 88

Unua eldono laŭleĝe deponita en Francio en decembro 2008. ISSN 1272-5188

Verkintaro :

Dominik Bertrand, Francine Bounhoure, Carlo Bourlot, François, André Henry, Marc,
Guy Martin, Kłod Martins, Isabel Monreal, Justine Rajalarisoa, Sérgio Sir, Juanita Turbillon.

Korektinto : Christian Rivière.

Direktoro de la revuo : Dominik Bertrand.

Greziljono 1978

Kio okazas ĉi jaron
en la kastelo ?

Marton

BÉNÉDICTE BABIN edziniĝas kun Philippe Mouchet en la plej proksima vilaĝo Saint-Martin-d'Arcé (foton 1). Festo okazas en la kastelo.

Bénédicte estas filino de Luce kaj Pierre Babin, kiu tiam prezidas la kulturdomon. Ŝi estas denaska greziljonano : ŝi naskiĝis en la kastelo mem! dum staĝo aŭguste de 1956.

Inter la 8^a kaj la 15^a
de aprilo

Okazas la « 4^a internacia printempa semajno », dum kiu disvolviĝas samtempe : – infan-renkonto, kun preskaŭ kvindek geknaboj, ĉefe francaj kaj italaj ; – kurso pri praktika pedagogio, kies temo estas « Kiel kursi ? » La partopreno estas vere internacia. Tiu periodo



Foto 1.

ebbligas sukcesan fruktodonan interŝanĝon, ĉar la instruantoj ĉeestas kurson cele al infanoj.

Inter la 3^a kaj la 22^a de julio

Okazas unua somera periodo, kun : prelegoj kaj debatoj laŭ kulturaj temoj kiel « Balzac en Anjou », « Jules Verne », ktp. ; ekskursoj laŭ la samaj temoj ; kursoj, kun S. Bourot, J. Vincent ; aktivaĵoj kutimaj (bindado, korbofarado) kaj novaj (makramo) ; distraj vesperoj...

Inter la 23^a de julio kaj la 12^a de aŭgusto

Okazas dua somera periodo, simile al la antaŭa, kun trinivelaj kursoj (J. Vincent, R. Lloancy, Molisson), ktp.

Inter la 13^a de aŭgusto kaj la 2^a de septembro

Okazas tria somera periodo, simile al la antaŭaj, kun trinivelaj kursoj (Parisot, H. Boyet, Boyet), ktp. Inter la aktivaĵoj estas fotoarto.

Inter la 3^a kaj la 12^a de septembro

Okazas staĝo de la grupo « Jean », kun kurso (Benistant).

Dum la tuta somero

Averaĝe ĉeestas ĉiun tagon en la kastelo po : sesdek ses personoj julie ; sesdek tri aŭguste ; kvindek du septembre. En ĉiu el la tri someraj periodoj partoprenas ĉirkaŭ okdek personoj.



Foto 2. – Julion 1978.

Ekzamenoj okazas fine de ĉiu kurso. Tamen la komitatanoj sub-strekas, ke ekzameno ne fariĝu nura celo por kurso.

Konstruaĵ-laboroj

Kreiĝas du klasĉambroj (A kaj B) en la kromdomoj, kun aldono de granda vitrita pordo. Apud la bindadoĉambro, dormoĉambro estas renovigita. En la kastelo, ĉambroj kaj koridoro estas plibonigitaj.

Pierre Métivier rimarkinde ornamas la kastelon per floroj.

Oni preparas baldaŭan konekton al la akvocirkvito de la urbo.

Atentu la vipurojn !

Verkis
Juanita Turbillon.

ONI OFTE aŭdis tion en Grésillon dum la unuaj jaroj de la esperantista kulturdomo. Estis vere, ke en la arbaro multis la fibestoj. Ĉiumatene la ĝardenisto ĉasis ilin, kaj kelkfoje mortigis dekon da ili. La tiama estraro decidis uzi pli naturan rimedon. Kelkaj erinacaj paroj estis liberigitaj en la arbaron, kaj, kelkajn jarojn poste, oni nur hazarde renkontis unu aŭ du, kiuj rapide fuĝis.

Ankaŭ mi plurfoje, trapasante la arbaron, vidis serpenton kaj aŭdis bruon en la sekigitaj folioj. Vipuro aŭ kolubro, mi ne riskis pridemandi la beston, kaj ankaŭ mi fuĝis. Ununuran fojon mi vidis plurajn, kiuj serpentumis malsupren, sur la nuda deklivo, tute supre, apud la tiama minigolfa ludejo.

Tamen, jarojn poste, oni ankoraŭ rekomendis :

« Atentu la vipurojn !

« Piedbruu ! Fajfu ! Kantu ! »

Ĉu vere pro la vipuroj ? Eble jes, sed estis ankaŭ alia kaŭzo.

Meze de la arbaro estis antikva ĉasrendevuejo, aŭ pavilono, aŭ kiosko, nomu ĝin laŭ via plaĉo, tre agrabla, ĉirkaŭata de belaj arboj, bone izolita, romantika, sed tamen sufiĉe proksima al la kastelo por ne maltrafi la sonorilon. Ideala loko por « privataj rendevuoj ».

Bedaŭrinde, kiam la kastelo estis plena, unu tia loko ne sufiĉis, kaj ofte ĝi jam estis okupata aŭ okupita (oni multe diskutis pri « ata-ita » en la epoko). Pro tio, estis bontone, alvenante al la padkruciĝo iom

brui por... timigi la vipurojn! Vi povas vidi la foton de la kiosko en la fotalbumo de Grésillon (kaj en ĉi foto 3).

Ĝi ne plu ekzistas, ĝi ruiniĝis, kaj oni decidis ne riparigi ĝin, ĉar la gejunuloj de Baugé ankaŭ ŝatis ĝin, sed difektis ĝin farante fajron por pikniki kaj lasante amason da rubaĵoj. Sendube ili ne timis la vipurojn!

Bedaŭrinda malapero, sed, tamen, en la arbaro :

« Atentu la vipurojn ! »



Foto 3. –
La tiama ĉaspavilono.

Greziljono 1988

Kio okazas ĉi jaron
en la kastelo ?

Inter la 3^a kaj la 9^a de aprilo

OKAZAS samtempe : renkonto de infanoj, kaj praktikaj konsiloj pri instrumentadoj, kun Audrey Childs-Mee kaj Dennis Keefe.

Inter la 14^a kaj la 30^a de junio

Okazas internacia amika renkonto kaj kursoj, kun tridek personoj.

Inter la 2^a kaj la 16^a de julio

Okazas : Ĉseh-seminario, kun A. Childs-Mee; prelegoj, far Che-verry, R. Lloancy, P. Métivier, Roose, Tangerud; kursoj.

Inter la 17^a kaj la 30^a de julio

Okazas diversgradaj kursoj.

Inter la 30^a de julio kaj la 6^a de aŭgusto

Okazas kursoj, inter kiuj estas nova kurso : « Ĉu verki Valane ? », kun Claude Piron. Ties sukceso estas granda, oni rimarkas ekridojn

tra la tuta bieno. Mankas tabloj kaj seĝoj, ĉar la kvanto de la parto-prenantoj kreskas dum la semajno, ĝis dudek. La grupo kune verkas novelon kiel ekzercadon, kiun oni legas en *Kulturaj Kajeroj*, n° 3, 1988, p. 12. Claude Piron klarigas sian metodon por ebligi ĝojan komunan verkadon en la sama numero, p. 15.

Inter la 6^a kaj la 27^a de aŭgusto

Okazas : formado de Esperanto-instruistoj ; preparado al atesto pri kapableco ; diversnivelaĵoj kursoj.

Dum la tuta somero

Gvidas kursojn : Abramowska, Childs-Mee, Grzybowski, Keefe, Laporte, Lloancy, Moirand, Piron, Roux, Vincent.

Pli ol la duono de la ĉeestantaro estas eksterlanda, el pli ol dudek landoj, el kvin kontinentoj. Dank' al tio, okazas pluraj divers-naciaj vesperaranĝoj.

Konstruaĵ-laboroj

Volontuloj renovigas la verandon, kaj du duŝejojn ; instalas pli bonan ventol-sistemon ; refarbas la ĉambron 26 ; refaras la barilon ĉirkaŭ la banejo ; aĉetas ok ĝardenbenkojn dank' al speciala donaco, kaj videoaparaton, lavmaŝinon...

Greziljono 1998

Kio okazas ĉi jaron
en la kastelo ?

EN JUNIO 1997, komisiono pri sekureco sendita de la subprefektejo tre detale vizitis la kastelon, trovis malkonformaĵojn kaj proponis fermon. Tamen la staĝoj okazis.

En oktobro 1997, nova raporto de la departementa sekurkomisiono postulis precizajn urĝajn laborojn : tuta refaro de la elektra sistemo ; instalado de alarmosistemo kun fumdetektiloj ; kaj pliaj aranĝoj. La kulturdomo alvokas monan helpon por pagi tiujn multekostajn laborojn. Kreiĝas fonduso « sekureco ».

Jam fine de 1997, mono alvenas. La printempa infan-renkonto de 1998 estas nuligita, sed la someraj staĝoj povos okazi.

Marton

Pliaj postuloj aperas : laboroj de la dua urĝeco fariĝas de la unua ! Kompreneble mankas kaj tempo kaj mono por plenumi tiajn postulojn antaŭ la somero.

Junion

La unuaj laboroj postulitaj en 1997 estas sukcese finitaj. Sed pro la novaj postuloj la sekurkomisiono malpermesas malfermon ! La staĝoj estas nuligitaj.

La kaso estas malplena, kaj ĝi daŭre restos tia pro manko de staĝanoj. Eĉ ne eblas pagi la impostojn. Bezonatas du milionoj da frankoj por : laboroj postulataj, pri kiuj kompetentas nur fakistoj ; modernigo delonge antaŭvidita por la ĉambroj, por la muroj... ; pago de la ĉiujaraj kontroloj kaj de la funkcionado por la alarmosistemo.

Ne nur financo malbonfartas. Mankas volontuloj por zorgi pri la administrado, kaj kultura kaj materiala, de la staĝoj.

La komitato proponas baloton por la oktobra jara membro-kunveno, elekton inter tri solvoj :

1. – Iu mecenato pagas la laborojn, kaj disponos la kastelon dum tuta jaro por propra uzado.
2. – La kulturdomo vendas la kastelon, kaj aĉetas pli malgrandan domon.
3. – Esperantistoj ankoraŭ donacas monon por la laboroj.

Someron

Malgraŭ oficiala fermo, alvenas esperantistoj malbone informitaj.

Dum la universala kongreso en Montpeliero, Francio, staras budo sub alvoko : « Helpu Grésillon ! ... Dankon. » Tie oni povas : subskribi defendpeticion sendotan al ministrino pri kulturo (kiu devenas de la regiono de Greziljono) ; promesi mon-donacon.

La monda esperantistaro emociiĝas.

Simila budo staros en 1999 dum la Berlina U.K.

Oktobron

Okazas jara membro-kunveno.

Pierre Babin informas, ke li ne plu povos prizorgi eldonon de *Kulturaj Kajeroj*.

Ducent dudek societanoj voĉdonas : 23 % por solvo 1 ; 47 % por solvo 2 ; 30 % por solvo 3. Oni decidas vendi la kastelon !

Konsterniĝo ; viglaj protestoj.

Dominique Babin prezidas la kulturdomon de 1990 (de kiam li anstataŭis sian patron Pierre). Li, kun siaj amikoj, apogas la solvon 2, li forte konsilas vendon. Li poste klarigos per publikigita letero :

« Mi opinias, ke la asocio pli gravas ol la loko... »

Fine, post debatoj, aperas tiu konkludo : 23 % kaj 30 % estas 53 % da homoj, kiuj ne volas vendi. La kastelo tiel lastminute saviĝas.

Dominique Babin eksiĝas, sed neniuj aliaj el la komitato deziras prezidi. Tiam oni modifas la statuton, por ke la societo funkcii sen prezidanto. (Almenaŭ ĝis 2009 ne estos prezidanto.) Paulette Naulet ludas la rolon de provizora prezidantino ĝis la venonta oficiala kunveno en januaro 1999 en Bouresse ĉe Kvinpetalo.

Decembron

La sekurkomisiono de la subprefektejo decidas, ke, se okazos etaj laboroj por plibonigi ilin, kelkaj lokoj, ĉambroj kaj la kuirejo estos uzeblaj, sed la etaĝoj, do la dormoĉambroj, restos malpermesataj.

Revenas espero. Planitas laboroj, pretiĝas staĝoj por 1999, de la 22^a de julio ĝis la 22^a de aŭgusto...

1998 : Malbonaj Memoraĵoj

Verkis
Juanita Turbillon.

EN 1998, fine de junio. Ekzakta dato ne gravas, sed la afero restos por ĉiam en mia memoro. Mi revenis el vojaĝo en Rusio, krozado inter Moskvo kaj Sankt-Peterburgo kun S^{ino} Amice loĝanta kiel mi en Tours. Ni devis rapidi, ĉar estis jam pli ol noktomezo, kiam ni revenis hejmen, kaj la duan tagon poste ni devis iri al Grésillon.

Rapide mi elpakis la valizon, ĵetis en la lavmaŝinon robojn, jupejn, subjupejn, somerajn puloverojn, ktp. Ek tuj al nova valizpakado, dum la maŝino ronronas. «Mi ne forgesu pantoflojn, poŝlampon, dentobroson. Por unu semajno, mi ne bezonos tro multe. Tamen eble pluvos en Grésillon, ankaŭ eble estos tre varme.»

Mi cerbumis pri la pakado, kiam telefono sonoris. Tiel malfrue, kiu estis? Estis S^{ino} Amice. Ŝi nur diris:

«Oni informis min, la staĝo ne okazos, Grésillon estas fermita!»

Ĉu mi respondis, mi ne plu scias. Mi falsidiĝis sur la telefonseĝon, kaj tie tiel restis senmove fulmtrafite plurajn minutojn.

La bruo de la maŝino rekonsciigis min. «Diabla maŝino, vi mokas min. Iru al diablo!»

Revenante en la vivĉambron, mi ne havis kuraĝon iri pluen, mi sidiĝis sur kanapo, kaj ekploris, ploris.

Ju pli la lavmaŝino bruis, des pli mi ploris. Mi pensis pri nenio, pri neniu, nur, ke Grésillon estas fermita. Kaj mi ploris sufiĉe da larmoj por finlavi la tolaĵon! Kiel stulta mi estis! Kaj la lavmaŝino haltis.

Post ankoraŭ kelkaj minutoj kaj kelkaj larmoj, mi komencis pensi. Sufiĉe da personoj estis atenditaj, kelkaj eĉ venas el Malagasio, ili certe estis survoje. Kion fari? Kiom da zorgoj por la staĝestro kaj la direktoro de Grésillon! Kaj mi denove ploris! Utilis al nenio, sed mi ne povis deteni min, mi ploris.

«Ne estu stulta, iru al la lito.» Kaj mi enlitiĝis ankoraŭ plorante.

La sekvantan matenon, la plena tute ĉifita maŝin-tolaĵo atendis min. «Vi havos la tutan semajnon por gladi», mi diris al mi. Sed mi restis trista la tutan semajnon, eĉ pli.

Du aŭ tri staĝoj okazis fine de la somero. Mi ne memoras, ĉu mi iris aŭ ne. Fakte mi pensis, ke la tutan someron la kastelo restos fermita, tiel mi timis.

Ĝis baldaŭ, kara Grésillon!



Foto 4. – Julion 2008, Juanita prezentas rakonton en sia kara kastelo.

La Fotelo de Zamenhof

Raportis nia enketisto
el kastelo Greziljono.



PIERRE MÉTIVIER estis homo konata kaj ege ŝatata en Greziljono kaj aliloke. Tiel kompetenta ĝardenisto, altnivela prelegisto, ktp. certe meritas fidon. Tamen li postlasis en la kastelo tiun fotelon, asertinte ke estis fotelo de Zamenhof mem!

Ĉu vero? Ĉu legendo? Ni enketu.

Foto 5. – La fotelo de Zamenhof, unu el la trezoroj kuŝantaj en la dua etaĝo de la kastelo Greziljono.



Foto 6. – Marko sub la fotelo garantias ties aŭtentecon.

Ĉirkaŭ la jaro 1850 en Vieno, Aŭstrio, aperis nova stilo : la seĝoj Thonet. Meblofabrikisto Michael Thonet inventis teknikon por produkti grandkvante seĝojn elegantajn kaj malmulte kostajn. Ĉefa ideo estis kurbigi lignon.

Kiam peco el ligno ricevas vaporon, kaj poste sekiga en muldilo, ĝi fine konservas la formon de la muldilo. Nur ŝraŭboj sufiĉas por kunigi la lignopecojn. Tio faciligas la konstruon de firmaj seĝoj.

Tiuj seĝoj el kurbigita ligno tre furoris en Eŭropo. Ja ili ludis gravan rolon en la disfamigo de la Vienaj trinkejoj, ĉirkaŭ la jaro 1900, signante tiaman kulturon.

La ankaŭ Viena firmao de Jacob (la patro) kaj Josef (la filo) Kohn aperis por konkurenci kun la firmao Thonet. Inter 1867 kaj 1914, Jacob & Josef Kohn produktis laŭ Thonet-a metodo multegajn diversajn seĝojn kaj fotelojn grandkvante en pluraj landoj de Eŭropo.

Zamenhof certe uzis fotelon Jacob & Josef Kohn dum siaj aventuroj... Sed ĉu li uzis tiun ĉi? Kiam? Kie? Enketo daŭras. Kiu donos al ni informojn por malkovri plu?

Kreado de bildrakontoj

Verkis staĝanoj
pri staĝo gvidita de Serĝo Sir
en Greziljono julion 2008.

LA FARADO de bildrakontoj estas kultura aktivaĵo, pri kiu povas interesiĝi ĉiu ajn, de infano ĝis plenkreskulo, kiel ajn oni ŝatas krei, pere de aŭ tute sen komputoro. Ni esperas, ke tiu ĉi kurseto utilos al multaj legantoj, ke kulturdomoj aranĝos denove tiajn staĝojn, kaj ke la revuo ricevos pliajn bildrakontojn. Daŭru la aventuroj de Steleto!

(Aldoniĝas al tiu kurseto, per kursivaj tipoj, niaj propraj decidoj dum nia staĝo, kiel ekzemploj.)

1. – Elektro de la formo.

«Bildrakonto» estas rakonto per bildoj, ofte kun teksto. «Bildostrio» estas bildrakonto konsistanta el nur unu strio.

Unue elektu grandecon : ĉu unu strio por ĵurnalo, ĉu plenaj paĝoj por libro...

Ni decidis labori por Kulturaj Kajeroj, do krei unupaĝan bildrakonton. Kiel en la unuaj numeroj de K.K., ni rakontu la aventurojn de Steleto.

2. – Elektro de la tekniko por la bildoj.

Bildo povas esti desegno, foto, pentraĵo... aŭ miksaĵo.

Elektu : ĉu desegni, ĉu foti, ĉu munti post tondado de revuoj.

Ne ĉeestis en nia grupo tre lerta desegnisto, krom la gvidanto. Taŭga solvo por ni estis : – fari la fonon per fotoj ; – fari nur la rolulojn per desegnoj ; – muntadi per komputoro.

3. – Dispartigo de la laboro.

Kunstaĝanoj povas labori : – sole : ĉiu kreas sian propran bildrakonton ; – skipe : ĉiu havas precizan taskon dum la farado de unika bildrakonto ; – grupe : ĉiuj laboras samtempe sur sama tasko, taskon post tasko.

Ni laboris grupe, ĉar celo de ĉiu el ni estis lerni ĉiun etapon.

4. – Metodo por munti desegnojn.

Bildrakonto, kiu aperas en revuo, ĝenerale ne fontis finpreta rekte el peniko. Estas pli oportune munti diversajn pecojn antaŭe desegnitajn. Jen tri solvoj : – mane desegni kaj mane munti ; – mane desegni kaj komputore munti ; – komputore desegni kaj komputore munti.

La trian solvon evitu neprofesiuloj. Ni tamen volis uzi komputorojn, ni elektis la duan solvon.

5. – Difino de la roluloj.

Antaŭ ol verki rakonton, estas necese kiel eble plej klare difini, kiu estas ties ĉefrolulo. En mallonga bildrakonto, unu rolulo sufiĉas. Se aperas dua rolulo, necesas ne nur difini ankaŭ ĝin, sed ankaŭ klare difini la rilaton inter ambaŭ roluloj.

Steleto estas eterne juna, simbolo de partoprenanto en kulturdomo. Li (aŭ ŝi) jam konas sian kulturdomon. Lia aspekto jam ŝanĝiĝis dum la fruaj Kulturaj Kajeroj, kaj denove ŝanĝiĝos




Foto 7. – Staĝo de Serĝo Sir
en la komputikoĉambro.

post venontaj desegnoj : tute ne gravas, ĉiu kreanto rajtas re-inventi nian heroon.

6. – Redakto de la rakonto-fadeno.

En mallonga bildrakonto plej gravas la fina ideo, la « kurten-falo ». Oni povas trovi ideojn laŭ du metodoj : – foti aŭ desegni tute hazarde, kaj provi diversajn muntadojn, ĝis kiam aperas interesa ideo; – antaŭ ol eklabori, kunparoli pri plej simplaj ideoj, kaj grupe plibonigi ideon.

La diversaj scenoj estas priskribitaj : – preferinde per listo (kaj sub-listo, ktp.) de la sinsekvaj agoj kaj paroloj; – eventuale per rapida skizo sur malneto, en kiu jam povas aperi unua vido de la enpaĝigo.


Ĉar ni staĝis en Greziljono, ni matene ekskursis en la apuda vilaĝo Pontigné. Inter aliaj vidindaĵoj, ni rimarkis la torditan turpinton de la preĝejo *. Do ni poste imagis tiun fadenon : Steleto alvenas ie kun tordita kolo. Iu demandas, kial la kolo tordiĝis. Steleto respondas, ke estas pro vizito al Pontigné. La sama « iu » respondas, ke Steleto bonŝancis ne troviĝi apud la sonorilturo de Kopenhago (kiu estas ankoraŭ pli tordita).

7. – Redakto de la scenaro.

Scenaro estas detala redaktaĵo de la diversaj scenoj de teatraĵo, filmo kaj simila (PIV).

Ni volis, ke nia rakonto plenigu unu paĝon, per kvar bildoj pli-malpli samgrandaj. Bildo 1 : Titolo « la Aventuroj de Steleto / Tordaĵoj »; portreto de Steleto. Bildo 2 : Fone aperas la kulturdomo Greziljono; la staĝestro ricevas Steleton; en veziko estas « Kio okazis al vi? » Bildo 3 : Steleto respondas « Mi vizitis la sonorilturon de Pontigné »; aperas bildo de Pontigné en veziko. Bildo 4 : La staĝestro respondas « Feliĉe, ke vi ne vizitis la sonorilturon de Kopenhago »; aperas bildo de Kopenhago en veziko.

* Noto pri turismo : Artikolo « Spiralaj Turpintoj kaj romantikaj sonorilturoj », en Kulturaj Kajeroj, n° 6, 1976, p. 3, prezentas kun multaj informoj unikan tuttagan rondiradon ĉirkaŭ Baugé, kiu ebligas malkovri kvin torditajn turpintojn.



8. – Desegnado de la roluloj.

Desegnantoj, kiuj ne fidas sian propran stilon, povas uzi unu el tiuj simplaj teknikoj : – desegni la korpon per etaj cilindroj interligitaj aŭ ne; – desegni la trunkon kaj la membrojn per fadeno kaj aldoni kapon, manojn, piedojn; – eltondi kaj foti folian pupeton (foton 8).

Ni decidis konstrui niajn foliajn pupetojn. Tamen dum la staĝo ni decidis ankaŭ krei la rolulojn per fotoj por pli rapide atingi rezulton. Tial nia bildrakonto aperas dufoje en tiu ĉi kajero.

9. – Muntado per komputoro.

En la komputoro povas esti : – ununura dosiero por tutpaĝa bildrakonto; – preferinde unu dosiero por ĉiu bildo (tiukaze la bildoj fine kuniĝos dum la enpaĝigo de la revuo).




Foto 8. – Prenu trionon de folio sufiĉe dika, dispartigu en 4 x 5 partojn, eventuale desegnu detalojn, eltondu, iomete faldu, kaj jen fotinda pupeto ! Nigra fono ebligas facilan perkomputoran tondon.

Bildo konsistu el pluraj tavoloj. Tiamaniere eblos ekzemple movi rolulon antaŭ fono, aperigi rolulon antaŭ aŭ malantaŭ alia, ŝanĝi travideblecon, ktp. Ĝenerale utilas ĝis kvin aŭ ses tavoloj : fono; unua rolulo; dua rolulo; blankaj vezikoj; vezikotekstoj; eventuale alia parto de la bildo.

10. – Regado de la komputoro.

Plej taŭga komputora programo estas sendube «Gimpo» (el la angla The Gimp) : sufiĉe potenca, preskaŭ profesia, tute libera kaj senpaga, bonege parolanta nian lingvon dank' al Linukso. Nuntempe per Interreto eĉ troviĝas retejoj, kie esperantistaj uzantoj diskutas kaj interŝanĝas ideojn pri Gimpo.

Gimpo ebligas multajn efektojn por krei belajn bildojn. Tamen estas necese lerni, kiel uzi ĝin, kaj longe trejniĝi. Uzanto nepre regu ĉi jenajn ilojn :

- agordo de la bildo-difino (fotilo proponas ofte 72 bilderojn cole, sed printilo postulas 600) kaj poste agordo de la bildo-grando;
- konservo de la dosiero laŭ formato propra al Gimpo, sed post laborfino laŭ pli uzata formato, ekzemple « Tiff »;
- ilo por flue vojaĝi inter la tavoloj;
- tondilo, kiu aŭtomate sekvas figurojn en bildo;
- kaj ĉiuj kutimaj iloj por desegni.

Partoprenis la staĝon kaj kreis la bildrakonton
Dominik Bertrand, Francine Bounhoure, Carlo Bourlot,
Guy Martin, Justine Ralalarisoa, Sergo Sir.

Maldeca Knabo !

Verkis
Klod Martins.

KIAM KLOD naskiĝas la 28^{an} de februaro 1927, neniu povas imagi, ke li laboros kaj promenos sur kvin kontinentoj, ne nur aviadile per ducent okdek naŭ flugoj plejparte pagitaj de liaj firmestroj, sed ankaŭ trajne, aŭtomobile, ĉevale, bicikle, azene, piede... Pri aŭtomobiloj, li nur petveturos, neniam li uzos taksion.

Klod suĉas la lakton de sia patrino. Pro tio li kreskas bonsane.

Klod vizitadas lernejon, ĉiam piede eĉ dum pluvaj tagoj. Trame veturi tro multe kostas. Laŭlonge de la deklivo de la tramvojo, li metas korkon en la U-relon plenan je akvo. Kun bastono, li sekvas ĝin... kaj malfrue alvenas al la lernejo! Alfoje dum fulmotondro, blanka bulego da fulmo ruliĝas laŭlonge de la fosaĵo terurante la knabon!

Ekde sia sesa jaro klod deĵoras kiel ĥorknabo. La patro vekas lin je la 5^a matene por matenmanĝi kaj tuj iri al la preĝejo servi ties pastron. Dum Rogacio kun la pastro, Klod, kiu kunportas sankt-akvuĵon enmane, promenas tra la kampoj, eĉ kiam frostegas, por beni ilin.

Sep-jara Klod dufoje tage piediras plurajn kilometrojn al la lernejo, eĉ kiam frostas aŭ neĝas, ĉiam vestita de tre mallonga pantalone. Liaj nudaj gamboj enprofundiĝas en la neĝon ĝis la femuroj.

La patro ankoraŭ ne konstruis banĉambron. Dekdu-jara Klod lavas sin en banujo sur la kahelaro malantaŭ kurteno. Elirante li metas

piedon sur la sapon, kaj tute nude surdorse kun periskopo al la ĉielo li glitas de sub la kurteno tra la tuta salono! La plej juna fratino, kiu neniam vidis knabon nudan demandas sian patrinon:

« Kion Klod havas, kion mi ne havas? »

Klod ĥorknabo okaze de funebro en la preĝejo tenas mane sankt-akvuĵon, en kiu li lasis aspergilon anstataŭ prezenti ĝin al la pastro. Tiu ĉi riproĉe flustras:

« Nepre ĉiam havu la aspergilon en la mano! »

Aŭdante tiun dusignifan aludon la ĥorknaboj ekridegas, kaj la vangoj de la pastro ruĝiĝas pro honto!

Plej agrabla momento estas dum Paska festo, kiam la ĥorknaboj kolektas kun korbegoj en la manoj ovojn, fruktojn, biskvitojn, ktp., sonorigante ĉe ĉiuj pordoj de la paroko, kantante:

« Ni petas vin kun honoro doni ion al ĥorknaboj. Tago venos, kiam Dio redonos al vi. Haleluja! »

La knaboj iras viziti farmbienulojn la plej donemajn sed la plej malproksimajn. Tra la kampoj ili profitas la okazon por urini ĉe ĉiuj senhomaj lokoj, provante pisi kiel eble plej alte! Sed amoranta paro kaŝata malantaŭ heĝo rigardas ilin petoli! Tiam kolere la ĥorknaboj ĵetas al ili freŝajn ovojn!

La patro tre religiema havas bibliotekon de nur religiaj libroj, escepte de kvar libroj, tamen de pastro Breuil, pri naskiĝo de la mondo. Klod vidante la patrinon, kiu boligas ĉokoladon en kaserolo, konstatas, ke aperas vezikoj de gaso, kiuj eksplodas, kaj ke la restaĵo tute similas ekzakte kraterojn de Luno. Sed kelkaj asertas pri asteroidoj! Kiel ili povus fali sur Lunon, kiu ĉiam rigardas Teron? La vivo ne naskiĝis sur Tero. Ĝi venis per la vostoj de kometoj, kiuj konsistas el blokoj da glacio enhavanta polenon. La kometo Halley trairas Teron kun sia vestego ĉiun sepdek-sesan jaron. Do glaciaj vostoj falas teren. Jen la deveno de akvo kaj plantoj.

Tiel pensas Klod.

En la urbo Leuze Klod trovas la biciklon de sia onklino, kiun ŝi lasis surstrate. Li rajdas ĝin kaj li rondiras ĉirkaŭ la placo. Bone Klod sciopovas bicikli.

Majon 1940. Estas milito en Francujo. Deĉlandaj soldatoj alproksimiĝas! La familio evakuiĝas al riĉa domo, kiu havas sekuran kelon. Klod ŝatas tion, ĉar la domo havas riĉan bibliotekon de geografiaj libroj. Li ankoraŭ ne scias, ke li promenos sur kvin kontinentoj, tamen sen iam riĉiĝi, ĉar li laboros nur dum duono de ĉiu jaro.

La regiono estas okupata de Deĉlandaj soldatoj. La patrino ekvidante ilin (kiujn nordaj francoj nomas « Boŝ ») diras :

« Estas tamen belaj viroj ! »

La fronta domo servas kiel kuirejo. La fratino Brigitte ludas sur la trotuaro. Per bastono ŝi provas forigi fekaĵojn de ĉevalo el la trotuaro al la ŝoseo. Sed ŝia movo estas tro forta : iu feko transiras la pavimon kaj hazarde falas en la kruĉon plena je kafo, kiun Deĉlanda soldato portas al la oficiroj! Kompreneble li ekkolas, dum la fratineto kuras plorante pro timego al sia patrino. Li refaros novan kafon.

Kun kamarado Klod tendumas arbare. Sub somera suno ili ĝisnude senvestiĝas. Subite soldato sturmas kun sia fusilo petante legitimilojn, kiujn tiam tro junaj ili ne havas !

Klod lernante teksumon en fabriko lanĉas al ligna plafono sageton, kiu sin alkroĉiĝas ne stabile kaj balanciĝas. Hazarde la firmestro kun senhara kranio eniras kaj staras ĝuste sub ĝi ! Ĉiuj metilernantoj streĉe rigardas la sageton, kiu feliĉe ne falas !

Semajnfine Klod kaj lia plej aĝa fratino iras en kamparon por ŝanĝi kuponojn provizitajn de la ŝtato por vino kaj vestaĵoj kontraŭ butero

kaj ovoĵoj, ĉar la familio kun siaj ses infanoj malsatas. Sed la vojaĉoj estas malregule pavumitaj, kaj la pneŭmatikoj de la veturilo estas ligitaj per ŝnuroj por ne eksplodi. Tio malpermesas bremsadon. Por iri al la farmbieno la infanoj devas trapasi kampon plenan je minoj kvazaŭ ladaj skatoloj. Klod vidas la malantaŭan radon, kiun lia fratino tenas mane, direktiĝi turne al mino. Li krias :

« Mimi, haltu ! »

Jam putranta ĉevalo kaj aŭto saltis eksplode.

Aŭguston 1942. Kun la aliaj metilernantoj Klod iras somerumi al la kamparo por helpi al rikolto de tritiko. La grupo vagonare iras ĝis Bohain (Aisne), kaj per alia sed antikva trajno al Brancourt. La lokomotivo havas altan kamentubon, kiu kraĉas pecojn de karbo ! Laŭ deklivo al supra monteto la trajno penas suprengrimpi. Tiam Klod saltas el vagono kaj kuras apude. Li resaltas en ĝin ĵus antaŭ la malleviĝanta deklivo, kiam la trajno ekrapidas.

En Brancourt la junuloj loĝas en la supra etaĝo de pastrodomo. Estas du ĉambregoj ambaŭflanke de ŝtuparo. Kompreneble fariĝas du malamikaj klanoj, kiuj senĉese kverelas. Iam Klod metas sitelon da akvo sur la pordon. Sed hazarde la pastro grimpas la ŝtuparon, malfermas la pordon kaj... ricevas la akvon sur sian kapon !

Iun vesperon pro klakego de la pordo ties riglilo difektiĝis. Ne plu eblas eliri el la ĉambro. La knaboj pisas tra la fenestro. Matene Klod faras ŝnuregon per la littukoj, kaj el la fenestro malsupreniras al la korto. Li prunte ŝtelas eskalon ĉe najbara farmbieno, kaj apogas ĝin ĉe la fenestro, por ke junuloj havu la eblecon iri al la laboro.

Pro libera tago Klod trajne veturas de Brancourt ĝis Le Catelet, kaj iras ĝis la enirejo de kanala tunelo. Vidante, ke ĝi estas lumigita, li decidas trairi ĝin, opiniante, ke post tri kilometroj restos sufiĉe da tempo por reveni al la stacidomo kaj trafi sian trajnon.

Piedirante sur la kajo Klod inverse preterpasas bargon. Tuj poste la lumo estingiĝas! Nur dek-kvin-jara Klod staras en plena mallumo, sur naŭdek centimetrojn mallarĝa kajo sen barilo. Li riskas fali akven, kaj li eĉ ankoraŭ ne scipovas naĝi. Ĉiukaze, se li falus akven, li ne povus suprengrimpi sur la kajon tro altan. Aliflanke estas malregula volbo ne glata, kontraŭ kiu foje kolizias la kapo de Klod.

Klod opinias, ke li paŝis jam dum ĉirkaŭ du kilometroj, do ke restas malmulte por atingi la elirejon aliekstreman. Sed fakte la kanalo estas longa je 5,67 km. Klod ne scias tion ĉar, sur la mapo antaŭe vidita, nomo de vilaĝo kaŝas la streketojn de la tunelo. Kaj Klod opinias, ke la tunelo ŝajnas longa! Palpante la rustan manrelon ĉe la muro, li malkvietiĝas ne vidante la lumon de la elirejo.


Fine post du horoj li trafas la elirejon. Uf! Sed li ne plu havas tempon por reiri al la trajno, kaj rezignacias reveni piede al la farmbieno tridek kilometrojn for. Kiam li alvenas, estas la dudek-dua horo nokte, kaj la farmbienuloj ne plu volas nutri Klod-on, kiu devas atendi la morgaŭan matenon por manĝi, post dudek kvar horoj!

En la loĝejo ne estas banĉambro, nek akvo. Ĉe fontano sur la ĉefa strato de la vilaĝo Klod senvestiĝas nuden kaj sin duŝas dum kamarado levas mantenilon por ŝprucigi akvon. Samtempe trapasas la lokon farmbienuloj sur ĉevalaj ĉaroj.

Sekkota.

Gloso:
Detĉlando: Germanio.

La Aventuroj de Steleto



Hajkoj

Verkis Greziljonaj staĝanoj
en kurso de Jean-Luc Kristos
julie 2008.

EL TRI linioj,
Bona, bela etoso,
Ni tuj imagas.

François.

En kvin silaboj,
Due sep kaj trie kvin,
Ĝi estas hajko.

Marc.

Ĉerizoj ruĝis,
Ci grimpis sur la arbon,
Kor' mia batis.

André.

Marŝaŭmon lulas
Ondoj dum sablo tiklas
Miajn piedojn.

Isabel.

Verku Kulturajn Kajerojn

Kial vi ?

Ĉar en niajn paĝojn

Ne venas komencantoj kun eminentuloj, ne instruistoj kun lernantoj,
sed homoj kun homoj.

Pri kio ?

Por la parto « Historio de kulturdomoj » :

Studu la (eĉ proksiman) pasintecon de via preferata kulturejo ;
Rakontu ĝin kiel eble plej neŭtrale, ne per opinioj sed per faktoj ;
Ne provu priskribi ĉion : elektu simplan temon, klaran atakangulon.

Por la parto « Kleriĝado » :

Klerigu nin per viaj fakaj scioj.

Por la parto « Distriĝado » :

Distru nin per rakonto originala kaj zorge konstruita.

Aŭ partoprenu nian anoncotan ludon.

Sed ne pri kio ?

Ĉar ni celas kleriĝadon, emancipadon, ni nenion publikigu pri :
politiko ; religio ; ekonomio ; pseŭdoscienco...

Krome estos rifuzitaj :

jam konataj tekstoj ; (plejofte) tradukaĵoj ; (nepre) krudaĵoj.

Kiel ?

Ĉe ni « verki » signifas : skribi, desegni, fotadi, komponi tuton...

Sendu vian proponon al

Dominik Bertrand, 7, rue des Brulis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr ».